

KUNVOKO

al la Jarkunsido de Kulturdomo de Esperanto

la 10an de junio 2017 en kastelo Greziljono je la 14a 00

La Jarkunsido okazos sabaton, la 10an de junio 2017. La registrado komenciĝos je la 13a 30 en salono Zamenhof.

Se vi deziras alveni en la kastelon jam vendredon vespere aŭ resti ĝis dimanĉo, bonvolu informi nin rete. Dimanĉon okazos la Komitatkunsido. Sabaton vespere, la kastelo estos okupata de grupo de luprenantoj, ni mem loĝos en la kromdomoj.

La societanoj, kiuj ne povos ĉeesti, bonvolu sendi sian rajtigilon plenigitan per la nomo de societano ĉeestonta dum la Jarkunsido, kontaktante tiun ĉi, por obei la statutan regulon limigantan la nombron de rajtigiloj je 5 por ĉiu persono. Vi povas konsulti la liston de la societanoj anoncintaj sian ĉeeston en la retejo, rubriko "Jarkunveno": gresillon.org/kunveno ; NB: okaze de rajtigilo sen nomo, tiu ĉi ne uzeblis por voĉdonoj sed estos enkalkulata por la kvorumo, nome 1/6 de ĉiuj societanoj - t.e. 45 – necesa, por ke la Jarkunsido povu valide labori.

Tagordo

- 1) elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) nombrado de la ĉeestantoj kaj de la rajtigiloj,
- 3) evoluo de la nombro de societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) agadraporto 2016, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 5) financa raporto 2016, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 6) aprobo de la kontoj por la jaro 2016 kaj imputo de la profito 2016,
- 7) buĝeto 2017,
- 8) kvitigo al la Komitato,
- 9) konstrulaboroj: aktuala situacio kaj prioritatoj,
- 10) aliaj demandoj.

Evoluo de la nombro de societanoj

La 31an de decembro 2016, kalkulinte forpasojn, donacojn de societaj partoj, perdon de societanecon se oni ne donis vivsignon dum tri jaroj, restis 273 societanoj kun 958 societaj partoj A (je 16 €). 98 societaj partoj B (je 200 €) estis akiritaj. Dum la jaro 2016, 2 novaj societanoj aliĝis, 8 societanoj donacis siajn societajn partojn, 11 societanoj estis eksigitaj (sed reakiris sociatanecon se ili petos), kaj 1 societano petis repagon de sia societa parto.

Agadraporto

La jaron 2016, kiel la jaron 2015, karakterizas ĉeesto de du deĵorantoj en la kastelo: Isabelle Nicolas konstante deĵoris inter aprilo kaj komenco de novembro, kun la celo disvolvi nian agadon. Geneviève Bouilloud, elektro-hipersentema, ĉeestis inter decembro kaj marto profitante malfortan poluon per elektro-magnetaj ondoj.

Krom ĉeestado de Isabelle Nicolas kaj Geneviève Bouilloud, dum la jaro 2016, la kastelo estis okupita dum 195 tagoj, t.e. 53% de la tempo: 59 tagoj da staĝoj, 85 tagoj da luadoj, 32 tagoj da laboroj, 12 tagoj de ne-esperantistaj aranĝoj organizitaj de Isabelle Nicolas kaj 2 tagoj por Jarkunsido kaj Komitatkunveno (sen nombri la 8 aliajn telefonajn komitatkunvenojn). La nombro de tagoj de Esperanto-staĝoj restis senŝanĝa: 59 tagoj en 2016 kiel en 2015. Ĉiuj semajnfinoj inter la 25a de marto kaj la 1a de novembro estis okupitaj, al kio aldoniĝas 4 semajnfinoj luadoj en novembro kaj decembro.

Staĝoj

PRINTEMPaS kunigis 59 ĉeestantojn de la 17a ĝis la 26a de aprilo, el kiuj 37 pagantoj (33 en 2015, 40 en 2014, 38 en 2013), kaj 14 trapasis ekzamenon (12 en 2015, 26 en 2014, 14 en 2013). La ekzamenantoj estis Katalin Kovats (skajpe) kaj François Lo Jacomo. La kursojn gvidis Radojica Petroviĉ, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut. Jannick Huet staĝestris kaj Frédéric Lahier kuiradis.

La renkontiĝo de la koruso Interkant' kunigis 21 ĉeestantojn de la 20a ĝis 24a de aprilo, el kiuj 18 pagantoj. Jannick Huet staĝestris, Zdravka Lenepveu korusestris kaj Frédéric Lahier kuiradis.

La someraj staĝoj okazis dum kvar semajnoj, kiel en 2015, t.e. 4 staĝoj kun respektivaj daŭroj 5, 11, 10 kaj 8 tagoj, entute 34 tagoj.

Eta turista semajno «La Luaro laŭ la vortoj» – de la 12a ĝis la 17a de junio – kun 2 partoprenantoj, Svisino kaj Anglino, gvidata de Jannick Huet koncerne programon kaj Isabelle Nicolas koncerne gastigon.

La dua semajno de reciprokaj interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj, de la 4a ĝis 11a de julio, kiun staĝestris Elisabeth Barbay, kun 19 pagintoj, membroj de SEL kaj RERS. Paralele, de la 4a ĝis la 15a de julio, 10-taga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto, gvidata de Christian Rivère, kun 4 lernantoj.

La unua staĝo «SOMERAS» de la 6a ĝis 15a de aŭgusto 2016, kun Jannick Huet kiel staĝestrino kaj kvin instruantoj: Mikael Bronŝtejn, Tim Morley, Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut, koncerto kaj kantateliero kun Ĵomart & Nataŝa, joko kun Marie Savary. Tiu ĉi staĝo naskiĝis en la jaro, kiam SES ne okazis, kun grava atento en nia retejo al anglalingva reklamado por allogi pli da alilandaj lernantoj. Inter la 42 ĉeestantoj el 11 landoj (DE, ES, FR, GB, IT, MG, NL, RU, PL, SW, SF), el kiuj 22 alilandanoj kaj 31 pagantaj staĝantoj. Nedevigan tuttagan ekskurson partoprenis 16 staĝantoj.

Fine, la sesa festa semajno por infanoj kaj familioj, de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto, kun staĝestro Bert Schumann kaj Nicky Janssen, Elisabeth Barbay, Ansofi Markov kaj Jean-Luc Kristos kiel instruantoj kaj animantoj. Ĉeestis 60 homoj, el kiuj 7 alilandanoj kaj 52 pagantoj. Dum la 3 lastaj tagoj aldoniĝis 10 membroj de EDE, kiuj partoprenis sian 9an someran universitaton en Greziljono.

Tiuj 4 staĝoj kunigis 143 ĉeestantojn (115 en 2015, 79 en 2014) el kiuj 117 pagantojn (107 en 2015, 59 en 2014). Kuiradis Frédéric Lahier.

La staĝon AŬTUNE, de la 24a de oktobro ĝis la 1a de novembro, estris Bert Schumann kaj Jannick Huet. Instruis kaj animis Dennis Keefe (BEK-kurso), Elisabeth Barbay, Bert Schumann, Lucie Hulot kaj Xavier Godivier. Nathalie Dubrulle animis atelieron pri ĝardenado, ĉefe de florbedoj. Paralele, inter la 27a kaj la 30a de oktobro, Zdravka Lenepveu gvidis la koruson Interkant' kiel korusestrino. Ankaŭ paralele, Jesse O'Scanian gvidis la reĉarpentadon de la lavejo. Inter la 51 ĉeestantoj, nombriĝas 17 pagantaj staĝantoj, el kiuj 11 infanoj kaj adoleskantoj 4- kaj 19-jaraj, 5 konstruantoj, 17 kantantoj de Interkant'. Kuiradis Frédéric Lahier. Aparte menciindas la gvidata trairado de nia arbaro fare de la infanoj, nokte kun lumetoj, preparita de Nathalie, kaj ankaŭ la falo de Jesse el la ponto – entute vespero plena je okazaĵoj.

Entute, dum la jaro 2016, la 59 tagojn de staĝoj (kalkulante la 7 staĝojn) vizitis 254 personoj (242 en 2015, 204 en 2014) kun 4438 manĝoj (4090 en 2015, 3340 en 2014) kaj 1519 tranoktoj (1455 en 2015, 1181 en 2014).

Ekde 2017, duona prezo ĝis nun valida por infanoj ekvalidos ankaŭ al adoleskantoj kaj personoj kun malgrandaj rimedoj: studentoj, junuloj, senlaboruloj...

Agoj de Isabelle Nicolas

La asocio « La Kampo de la Griloj », prezidata de Isabelle Nicolas, daŭrigas sian vivon cele al disvolvado de novaj agadoj, por kiuj nia statuso de kooperativa societo estas malhelpo.

Isabelle preparis artistan staĝon fine de majo kaj semajnon por la paco komence de junio. La 30an de aprilo vespere, la teatraĵon 'La masakro de la sultano Hamid' spektis kelkaj Baugé-anoj kaj partoprenantoj de la jarkunsido de SAT-Amikaro. La 3an de junio vespere, okazis en la korto de la kastelo koncerto de la koruso La Viva sur podio instalita de la urbo Baugé.

Duan fojon, la eŭropaj tagoj pri heredaĵo okazis en Greziljono la 17an kaj 18an de septembro 2016, kun teatre gvidata vizito kaj kun la filmo de Greziljono dum la 50aj jaroj en salono Zamenhof, agrabligita per manĝeto. Dum ĉiu tago, 5 grupoj de 10 ĝis 15 personoj sekvis la viziton, entute 120 Baugé-anoj vidis la kastelon. Inter la 12a kaj la 22a de septembro, ekspozicio pri akvareloj de René Le Quillec, kiu publike prelegis pri "La spiralaĵoj" antaŭ dudeko de personoj.

Isabelle organizis krome staĝon pri permakulturo la 15an kaj 16an de oktobro kun trideko da partoprenantoj. Pere de Isabelle, ateliero pri tradicia ĉarpentado, gvidata de Jesse O'Scanlan, ebligis reĉarpentii la lavejon je minimuma kosto.

Luadoj

La kvaran jaron, la kastelo estis malfermita por privataj luoj. La 27 luoj (22 en 2015, 14 en 2014) enspezigis 41 788 € malnete, t.e. 33 287 € nete (en 2015: 28.234 € malnete, t.e. 21.200 € nete). Okazis infana feriado kaj venis grupo de aŭtomobiloj Porsche 911, dum 3 semajnoj de lernejoj ferioj, kiuj plenigis la senstaĝajn semajnojn. Naŭ luoj utiligis niajn kuiristojn Frédéric Lahier aŭ Frédéric Sourice. La ĉambrojn antaŭ la luoj kaj staĝoj purigis Amélie Sourice.

Konstrulaboroj

Dum 32 labortagaj aŭ semajnfinaĵaj tagoj de volontulaj konstrulaboroj kaj la 18 tagoj de la ĉarpenta ateliero, ni daŭrigis la komencitajn laborojn.

Koncerne fajro-sekurecon, la pordofermilojn oni instalas en la ĉambroj. Komence de 2016, la paneintan malnovan fajro-alarmilon anstataŭigis Frédéric Lauriol. La nun malpermesitajn jonajn detektilojn li anstataŭigis per optikaj detektiloj.

Koncerne viv-vkaliton, en la ĉambro 26, la malnova felta tapiŝo kaj la betona slabo estis forigitaj kaj la kaheletoj prizorgitaj. Tapetpaperon oni gluis en la koridoroj de la nov-uzataj ĉambroj 21 ĝis 26.

Koncerne la lavejon, la ĉarpentaĵon de la lavejo oni restaŭris dum la ateliero pri tradicia ĉarpentado gvidata de Jesse O'Scanian. Poste, en 2017, la cementon de la lavejo oni restaŭris, latojn muntis kaj ardezojn fiksas Pierre Grollemund kaj aliaj volontuloj: ĉio ĉi kostis entute 1321 € nete.

Dum kristnasko 2016, la lageto malpleniĝis pro rompiĝo de breto de elfluejo. René Jelenc anstataŭigis ĉiujn bretojn de ĉiuj tri defluejoj.

Jen ĉi-sube konstrulaboroj faritaj de firmaoj.

Niaj elektraj kaj telefonaj kabloj estis subterigitaj, kaj la aere lokitaj kabloj forigitaj.

La longdaŭra ludonado de la Verda Vojo komenciĝis la 1an de januaro 2016, la tieaj konstrulaboroj estas finitaj, la urbo instalas portalon kaj panelon, ni nun povas iri piede aŭ bicikle ĝis Baugé ne uzante la departementan vojon (por aŭtomobiloj) al Le Lude, 10 mn sufiĉas por atingi la naĝejon.

Gipsisto renovigis la plafonon de la antaŭŝtuparo (eksa ĉambro) 11 per gipsplato kontraŭ 537 € nete.

Elektristo-hejtisto anstataŭigis la malnovan regulilon de la substacio kontraŭ 1478 € malnete.

Ŝtontajlisto restaŭris la frakasitan okcidentan frontono super la ĉambro 30, tegmentisto renovigis la zinkajon de la gutujo malantaŭ la frontono kaj la tuŝanta gropa tegmentero. Ĉio ĉi kostis entute 15 315 € nete.

Liston de prioritatoj por la sekureco kaj la savado de la konstruaĵoj oni starigis. Sekve de tio, konstrulaboroj okazas nuntempe por renovigi la 4 finialetojn de la ĉefa fasado, por restaŭri la frontonon de la ĉefa fasado kaj por renovigi la tegmenteron malantaŭ tiu ĉi frontono. Tio ĉi kostos ĉirkaŭ 20 000 € nete.

Ni danku al Annie Griffon, Bert Schumann, Dominique Baron, François Lo Jacomo, Frédéric Dambreville, Frédéric Lauriol, Geneviève Bouilloud, Gheorghe Florea, Jean-Jacques Moreau, Jesse O'Scanlan avec Guillaume & Aliénor, Isabelle Nicolas, Isabelle Peyre, Nathalie Dubrulle, Pauline Gaborit, Pierre Grollemund, René Jelenc, Ugo de Maubeuge kaj Yves Couturier, kiuj partoprenis en tiuj diversaj semajnfinoj kaj volontulaj laboroj.

Financa raporto

Por la jaro 2016, la sumo de la enspezoj atingas 100 552 €, do 20% pli ol en 2015, kun stabilaj staĝaj enspezoj je 43 719 € kaj granda altigo de luaj enspezoj ĝis 50 419 € (+ 66%).

Tiu ĉi altigo de la vendosumo ĉefe ebligis al ni realigi gravajn konstrulaborojn por prizorgado de la kastelo, ĝis sumo je 25 200 €, entute pagitaj per la enspezoj de la koncerna jaro. La kostoj estas stabilaj koncerne salajrojn kaj socialajn kostojn, kaj ankaŭ energikostojn. Malaltiĝis la manĝokostoj (pro grava stoko komence de la jaro), alitiĝis la impostoj (bienimposto + 30% kaj submetiĝo al lernimposto).

Entute la kostoj, lu-makleraĵoj kaj vojaĝkostoj estas stabilaj.

La societa kapitalo altiĝis je 600 € (– 400 € pro societaj partoj A kaj + 1000 € pro societaj partoj B).






La ĉapitro «aliaj vendoj» altiĝis pro altiĝo de la vendo de libroj, malaltiĝo de la butikoj kaj altiĝo de la diversaj vendoj, ĉefe pro vendo de ekskursoj.

Koncerne disponeblan monon, ni havis je 31/12/2016 entute 113 062 € el kiuj 3 049 € en ĉekkontoj, 93 013 € en ŝparkontoj kaj 17 000 € kiel societaj partoj de nia banko Banque Populaire.

Somera programo 2017

Resumo de la someraj semajnoj 2017 kun Esperanto-kursoj



	Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esp-kurso	Renkonto de Alternativoj kun Esp-kurso (antaŭ FESTO)	Festa Semajno por infanoj kaj familioj (post FESTO)	SOMERaS popoldancoj, pupteatro kaj E-kursoj
<i>por kiu ?</i>	lernantoj de Esperanto, asocioj pri scio-interŝanĝo	mense junuloj, lernantoj de Esperanto	infanoj, adoleskantoj, familioj kun beboj kaj geavoj	dancemuloj, infanoj, familioj
<i>datoj</i>	2017-jul-10/17 (S1)	2017-jul-17/27 (S2)	2017-aŭg-05/13 (S3)	2017-aŭg-21/28 (S4)
<i>kursoj kaj aktivajoj</i>	<ul style="list-style-type: none">▶ Esperanto-kurso por progresintoj▶ interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj▶ bindado▶ muzikado	<ul style="list-style-type: none">▶ prelegoj pri alternativaj temoj▶ Esperanto-kurso por progresintoj▶ jogo▶ meditado▶ muzikado	<ul style="list-style-type: none">▶ manpupoj▶ origamio▶ manlaboroj▶ banado en lagoj▶ sportaj aktivajoj▶ Esperanto-kursoj▶ bindado▶ jogo▶ kantado	<ul style="list-style-type: none">▶ pupteatra spektaklo, manpup-farado▶ popoldanca kurso▶ popoldanca balo▶ Esperanto-kursoj▶ manlaboroj▶ sportaj ludoj▶ baladaj ĉendancoj
<i>animantoj instruantoj staĝestro</i>	<ul style="list-style-type: none">▶ Elisabeth Barbay▶ Caroline Mauboussin▶ Perla Mielo▶ Isabelle Nicolas 	<ul style="list-style-type: none">▶ Perla Mielo▶ Marie Savary▶ Isabelle Nicolas▶ Xavier Godivier 	<ul style="list-style-type: none">▶ Nicky Janssen▶ Larisa Osadčuk▶ Jean-Luc Kristos▶ Ansofi Markov▶ Caroline Mauboussin▶ Marie Savary 	<ul style="list-style-type: none">▶ Christophe Frank▶ Danka Leyk▶ Martin Strid▶ Françoise Noireau▶ Jean-Luc Kristos▶ Elisabeth Barbay 

Vi povas informiĝi pri niaj kursoj kaj staĝoj kaj aliĝi laŭ diversaj manieroj:

- en nia retejo sub: gresillon.org/agendo kaj: gresillon.org/aligo
- per retletero al: kastelo@gresillon.org
- per telefono al: +33-2 41 89 10 34 (Isabelle), +33-6 51 24 24 23 (Bert), +33-2 99 83 69 86 (Jannick)
- per letero al la sekretario: Schumann/MCE, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné, FRANCE
- venante al: Grésillon, route du Lude, Saint Martin d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou, FRANCE

Via Kulturdomo bezonas vian helpon!
Bonvolu aliĝi kaj aligi viajn amikojn.